Kultura Festo

koncerto, recitoj kaj prelegoj
honore al L. L. Zamenhof naskiĝinta antaŭ 150 jaroj
Sabaton 7an de novembro

CDELI - Biblioteko de la Urbo - La Chaux-de-Fonds, Progrès 33

Programo de tiu jubilea festo-tago

10.00 : Malfermo de la salono de CDELI kun eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

11.00 : Malfermo de la Aŭlo.

11.30 : En la Aŭlo :

Koncerta recitalo de Elisabeth de Mestral, soprano, kun la pianisto Wolfram Fischer. **Poemtradukoj de Dominique de Mestral.**

13.00 : Komuna tagmanĝo en najbara restoracio.

14.30 : **Prelego de Sébastien Moret pri Ruslando kaj Zamenhof**.

15.15 : Paŭzo.

15.30 : **Premiado** de partoprenintoj al la Kultura Seminario kaj sub la gvido de **Claude Gacond** laŭtlego, fare de esperantistoj el tuta Svislando, de **citaĵoj el la paroladoj kaj verkoj de L.-L. Zamenhof**, kiuj atestas pri la daŭra aktualeco de la penso de la iniciatinto de la Lingvo Internacia.

16.00 : Konkludaj vortoj.

16.15 : En la CDELI-salono : **Konkluda teumo** kaj amika babilado, libroservo.

17.30 : **Oficiala fermo**.

(Por la kovrado de la organizaj kostoj estos petita partoprenkotizo de fr 10.-)

Nepre partoprenu tiun jubilean festadon de la 150a naskiĝjaro de Zamenhof.

(Detalaj informoj pri la koncerto kaj la prelego sur la sekvaj paĝoj)

Koncerta recitalo de Elisabeth de Mestral, soprano kun la pianisto Wolfram Fischer

Poemtradukoj de Dominique de Mestral

11.30 en la Aŭlo sametaĝa al la CDELI-salono en la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

La tri romandaj kaj alemana esperantistoj Elisabeth kaj Dominique de Mestral kaj Wolfram Fischer kunlaboras por malkovrigi al la esperanto-publiko kantojn el la repertuaro de la francaj melodioj, kies komponistoj vivis en la tempo de L.L. Zamenhof (fino de la 19a kaj komenco de la 20a jarcentoj).

Elisabeth de Mestral komencis kanti en eklezia koruso kaj studis pianon kaj poste kantadon ĉe la Muziklernejo de Montreux. Paralele al sia komerca studado ŝi daŭrigis sian primuzikan fakiĝon en la profesiaj klasoj de la Ĝeneva Muziklernejo. Ŝi estris la koruson *La Caecilia* en Montreux et perfektiĝis sekvante staĝojn pri malnova muziko en Francio kaj pri *Lieder*-kantado en Vieno (Aŭstrio). Ŝi soliste kantas dungita de korusaj koncertoj aŭ de orkestroj en preĝejoj kaj muzikaj festoj. En 2007 ŝi kreis la *Svisan Koruson*.

Wolfram Fischer studis pianon en alemana Svislando dum deko da jaroj. Palarele li profesiiĝis komputikistike. Ekde pli ol 20 jaroj li plenumas la funkcion de orgenisto akompananta korusojn kaj muzikistojn.

Dominique de Mestral, la tradukisto de la kantotaj poemoj, efektivigis beletrajn, prilingvajn kaj primuzikajn studojn, kiuj vekis en li viglan intereson al la lingvoj latina, greka, franca, germana, angla, rusa kaj itala, kaj nun esperanta. Esperantigo de poemoj estas por li aktiveco riĉiga kaj ludkaraktera.

Programo, kies kant-tekstoj estos disdonataj al la koncertpartoprenantoj :

Bela vespero **Beau soir** Claude Debussy
Impresionisma etoso kaj invito ĝui la vivon

Apud' river **Au Bord de l'eau** Gabriel Fauré
Kviete iu paro sonĝas…ĉio forpasas krom eterna am'

La Kera reĝino **La Reine de cœur** Francis Poulenc
Lunluma sonĝado pri ludkarto

Kia Aventuro ! **Quelle Aventure !** Francis Poulenc
Kio okazas, kiam pulo promenigas elefanton !

Se **C** Francis Poulenc
Memoroj rilate la "Pontojn Se", aludoj al eventoj ekde la mezepoko ĝis la dua mondmilito

La Knabinoj de Kadiks'	**Les Filles de Cadix**	Leo Delibes

Kiel sedukti la fierajn kaj viglajn hispaninojn !

Kanto malgaja	**Chanson triste**	Henri Duparc

Amo resanigas vundojn…

Serenado	**Sérénade**	Charles Gounod

La paroloj, kiujn oni ŝatus aŭdi de sia kunulo aŭ kunulino

Belulin' daŭre nea	**Oh! Ma Belle rebelle**	Charles Gounod

Sopiro de iu trubaduro por iu necedema belulino

Aprila Kanzon'	**Chanson d'avril**	Georges Bizet

Ĝoja zumado de la printempo : vekiĝo de la vivo kaj amo !

Mi havas 2 amantojn	**J'ai 2 amants**	André Messager

La virinoj multe ŝatos tiun kanton, la viroj iomete malpli…

La Vojoj de l'amo	**Les Chemins de l'Amour**	Francis Poulenc

Sur ritmo de valso, dolĉaj rememoroj pri la unua amsperto

Fratineton ni volas	**Les Petites sœurs**	Francis Poulenc

Kiam infanoj elektas fratinon, kiel kristnaskan donacon !!

-oOo-

Prelego de Sébastien Moret pri Ruslando kaj Zamenhof

14.30 en la Aŭlo sametaĝa al la CDELI-salono en la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

La **prelego de Sébastien Moret pri Ruslando kaj Zamenhof** konsistos el tri eroj :

1. **Ruslando je la zamenhofa epoko.**
2. **Esperanto en la cara Ruslando.**
3. **Esperanto en Sovetio.**

Sébastien Moret estas kunlaboranto en la Sekcio pri slavaj lingvoj ĉe la Laŭzana Universitato, kie troviĝas rondo de esploristoj pri la prilingva historio en Centra kaj Orienta Eŭropo. Kadre de tiu fako li interalie efektivigas esplorojn pri interlingvistiko kaj pri esperanto en Sovetio, kaj pri la historio kaj epistemologio de la artefaritaj lingvoj ĝenerale.

-oOo-